



Ankaŭ en Supra MalDekstra angulo 'internen-metu' sur '2-1 punkton'.




Diag. 16 (Ĝusta kurso 1-13) Nigro, per du esencaj metoj, nome N3 'kojnumi' kaj N7 'internen-meti', sukcesis malmultigi Blankajn teritoriojn, krome 'metrajton-tenante', sekve trans-iras al Supra MalDekstra angulo.

{paĝo 238 de la originalo}


Nigro ankaŭ 'esence metas' sur 2-1 punkton. Cetere, en ĉi tiu kazo, eblas ŝtonmeti ek de N-a. (Pri ĉi tio poste skribos.)




Diag. 17 Kontraŭ N1, Blanko nepre forkaptas per B2.




Diag. 18 Ĉi tiam Nigro ŝtonmetas N3. Se Blanko respondus per B-a, kompreneble Nigro tuj mortigus blankan ŝtonaron per N-b 'minaci'.




Diag. 19 Blanko nepre devas repondi per B4. Kaj kontraŭ N5 'minaci',...



Diag. 20 Blanko ne havas alian rimedon ol sin-gardante batali per B6. Nigro forkaptas du ŝtonojn per N7,...




Diag. 21 kaj procedas ĝis 'rekapti' per B8. En ĉi tiu formo,...




Diag. 22 Finfine, kontraŭ N-a, kompreneble Blanko devos 'sinligi' per B-a, kaj poste per B-c. {Ĉar, kiam la liberpuntoj estas ŝtopitaj ĝis restante unu, Nigro povas komenci 'alterne-kaptadon' forkaptante blankan unu ŝtonon sur la vertico.}

{paĝo 239 de la originalo}




Diag. 23 (Rezulto) Supozante ĉi tiun rezulton, Blanka teritorio nombriĝas je 3 poentoj, sumigante 2 poentojn de 'a' (spuro de forkapto) kaj 1 poenton de 'b'. Dum la procedo ek de diagramo 17 ĝis 21, ambaŭflankaj forkaptis du ŝtonojn respektive. Do ni kontraŭpezu la

forkaptojn, kaj konklude la Blanka teritorio kalkuliĝas je 3 poentoj. (Necesas pensi nur Blankan teritorion sur diagramo 23.)




Diag. 24 Cetere, kiam Nigro unue 'minacas' per N1, Blanko nepre devas 'forkapti' per B2.



Diag. 25 Sekve Nigro 'internen-metas' N3, la formo fariĝas sama al diagramo 18. En ĉi tiu kazo, eblas interŝanĝo de la metordo.


Krome, suplementas jene; anstataŭ N3,...




Diag. 26 Malbone estas N1 'minaci'. Blanko singardas per B2 sur la vitalan punkton, kaj gajnas 1 poenton, komparante kun la ĝusta kurso. (Kompleneble, sekve Nigro forkaptos du ŝtonojn per N-a, kaj Blanko rekaptos, kaj finiĝos la lim-aranĝon ĉi tie.)

Nun ni finas la studon pri Supra MalDekstra angulo, kaj trans-iru al lasta malfacilaĵo en Supra Dekstra parto.

{paĝo 240 de la originalo}



Diag. 27 (Fuŝo) Se Nigro 'batas kaj sinligas' per N1 kaj N3, Blanko 'sinligas' per B4, kaj finiĝas la ludon {en japana regulo}.



Diag. 28 (Fuŝo) Aŭ se Nigro 'forkaptas' unu ŝtonon per N1, Blanko 'batas' per B2 kaj finiĝas la ludon {en japana regulo}.

Ĉar N1 kaj N3 'bati kaj sinligi' en digarmo 27, kaj N1 'forkapti' en diagramo 28 ambaŭ estas valoraj je 2 poentoj, ne diferencas, kiun el ili Nigro elektas.

Alivorte la 'bati kaj sinligi' kaj 'forkapti' estas alternative, do Nigro ŝtonmetas unu el ili, Blanko metas alian samvaloran. Unuavide estus ne alian rimedon,...tamen...

{paĝo 241 de la originalo}